# *Spertulo de UN asertas ke ne ekzistas humanitara krizo en Venezuelo.*



Havano, 26 feb (RHK) Alfred De Zayas, spertulo de UN agnoskis la negativajn sekvojn de la ekonomia milito en Venezuelo, sed asertis ke ne ekzistas nuntempe humanitara krizo en la sudamerika lando.

La respondeculo pri la impulsado de internacia ordo demokratia kaj egaleca flanke de UN, esprimis al la televida ?eno Telesur, ke spite al tio ke  estas mankoj kaj malprovizoj en tiu ?i lando, la situacio ne similas al vere malfacilaj panoramoj ekzistantaj en aliaj landoj.

Por homo kiu vivis kaj laboris dum jardekoj por UN kaj bone konas la situacion en landoj de Azio, Afriko kaj kelkaj en Ameriko, klaras  ke la situacio de Venezuelo ne estas humanitara krizo, li asertis.

Li anka? pledis por pli da solidareca kampanjo favore al Venezuelo, por ke tiu ?i lando povu transvivi tiun ?i situacion kaj esprimis ke la internacia komunumo devas labori por haltigi la punojn altruditajn de Usono kiuj dama?as la venezuelan popolon. Precize tiuj ?i punoj de Usono malfaciligas la situacion en la sudamerika lando.

La spertulo, kiu voja?is la pasintan novembron al Venezuelo, taksis kiel senvaloraj la argumentojn de Usono, kiu volas per tiaj argumentoj, provoki  ?an?on de registaro kiu estis demokratie elektita kaj

prezidata de Nicolás Maduro.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/156048-spertulo-de-un-asertas-ke-ne-ekzistas-humanitara-krizo-en-venezuelo

**Radio Habana Cuba**